

ĈIUJ MANĜIS ĜISSATE – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 14,13-21

En tiu tempo Jesuo, aŭdinte pri la morto de Johano, foriris per ŝipeto al dezerta loko, for de ĉiuj. Sed la popolo tuj eksciis pri tio, kaj sekvis Lin piedirante el pluraj urboj. Elŝipiĝante Li vidis tiun grandan homamason; Li kortuŝiĝis pri ili kaj sanigis iliajn malsanulojn.

Kiam vesperiĝis, la disĉiploj iris al Jesuo kaj diris al Li: “Estas malfrue, kaj la loko estas dezerta: forsendu la homojn; tiel ili iros al la proksimaj vilaĝoj aĉeti por si manĝaĵon”. Sed Jesuo respondis: “Ne estas necese, ke ili foriru; donu vi mem al ili por manĝi”. Ili respondis: “Sed ni havas ĉi tie nur kvin panojn kaj du fiŝojn”. Tiam Jesuo diris: “Portu ilin al Mi”. Kaj li ordonis, ke la tuta amaso sidiĝu sur la herbo. Li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, levis siajn okulojn al la ĉielo, kaj dankis Dion. Poste Li rompis la panojn kaj donis ilin al la disĉiploj; kaj ĉi tiuj portis ilin al la popolamaso. Ĉiuj manĝis ĝissate. Fine oni kolektis dek du plenajn korbojn da postrestintaj fragmentoj. Tiuj, kiuj manĝis, estis ĉirkaŭ kvin mil viroj, krom virinoj kaj infanoj.

La epizodo de la kundivido de la panoj kaj de la fiŝoj estas tiom grava, ke ĉiuj kvar evangeliistoj ĝin rakontas. Ili ĝin rakontas ĉar en ĉi tiu epizodo ili vidas ne nur signon plenumitan de la Sinjoro, sed en ĝi ili bildigas kaj anticipas la eŭkaristian vespermanĝon. Do la tuta peco estas anticipaĵo – kaj komprenigo – de la profunda signifo de la eŭkaristia vespermanĝo de Jesuo.

Pro tio la evangeliisto metas indikojn en la teksto por komprenigi ke – atenton! – li ne rakontas simplan okazintaĵon, sed li transdonas teologian veron. Jen kial en ĉi tiu epizodo, kiun ni trovas ĉe ĉapitro 14 de Mateo, versikloj 13-21, antaŭ ĉio la evangeliisto indikas la saman momenton de la lasta vespermanĝo. Li diras ke ĉe vesperiĝo alproksimiĝas la disĉiploj, estas homamaso kiu sekvis Jesuon kaj komencis la novan eliron, la novan liberiĝon, kaj la disĉiploj, kiuj ne estas solidaraj kun la amaso kaj ne komprenas, petas ke Jesuo forsendu la homojn por ke tiuj iru kaj aĉetu por si manĝaĵojn. Ili ankoraŭ ne akceptis la spiriton de la beatproklamoj, de la kundivido.

Kaj Jesuo rebatas, kaj jen la profunda indiko de la signifo de eŭkaristio, «*Ne estas necese, ke ili foriru*», kaj al tiuj kiuj utiligis la verbon aĉeti Jesuo rebatas per la verbo doni. Oni ne aĉetu, sed kundivido. Sed la aparta verboformo utiligita de la evangeliisto por esprimi ĉi tiun frazon havas apartan signifon.

Jesuo diras: «*Donu vi mem al ili por manĝi*», laŭvorte “donu vin mem al ili por manĝi”. Jen la signifo de la eŭkaristio. En la eŭkaristio Jesuo faras sin mem pano, vivnutraĵo, por ke tiuj, kiuj ĝin akceptas, estu siavice kapablaj fariĝi pano, vivnutraĵo por la aliaj. Ne sufiĉas doni panon al la homoj, sed estas necese fariĝi pano por la homoj. Jen kial la evangeliisto utiligas ĉi tiun esprimon: “Donu vin mem al ili por manĝi”.

Jen la signifo de la eŭkaristio. En la eŭkaristio oni ne nur donas panon, sed oni fariĝas pano por la aliaj. La disĉiploj rebatas, ke tio kion ili havas ne sufiĉas, fakte ili diras, ke ili havas nur «*kvin panojn kaj du fiŝojn*». Ili atingas la nombron sep, kiu, en la juda simbolaro, signifas ĉion kion ili havas. Kiam oni retenas por si, tio kion oni havas ŝajnas ne sufiĉa; kiam oni kundividas, kontraŭe, oni kreas abundon.

Fakte Jesuo petas, ke oni alportu ilin al li, kaj jen la indikoj pri la signifo de eŭkaristio. Antaŭ ĉio Jesuo ordonas, postulas ke la homamaso

sterniĝu. Kial Jesuo devas ordoni? Li ordonas ĉar estas rezisto. Kaj kial li petas, ke la homamaso sterniĝu? Ĉu ili ne povas manĝi laŭplaĉe, side, stare?

En la festotagaj manĝoj, en la solenaj manĝoj, oni manĝis laŭ la romia kutimo, sterne sur litetoj. Sed kiu povis manĝi tiamaniere? Nur tiuj, kiuj havis servistojn kiuj povis servi al ili. Jen do la altvalora indiko, kiun donas al ni la evangeliisto: la eŭkaristio utilas por ke la homoj sentu sin "mastroj". Tial la disĉiploj, kiuj estas liberaj homoj, metas sin je la servo de la aliaj, de tiuj kiuj estas konsiderataj servutuloj fare de la socio, de la lastaj, de la marĝenigitaj, de la ekskluditaj, por ke ili malkovru la plenan dignon, tiun de mastro.

Kaj kial Jesuo devas ordoni? Ĉar estas rezisto. La homoj ne ŝatas esti submetitaj, sed ne ŝatas la liberon. Kaj la evangeliisto ĉi tie prezentas al ni la samajn gestojn, kiujn Jesuo plenumos en la lasta vespermanĝo. "*Li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, levis siajn okulojn al la ĉielo*", signifas dian komunikon, "*dankis Dion*", danki signifas ke tio kion oni havas ne plu estas propra posedaĵo, sed ĝi estas ricevita donaco, kaj kiel tia kundividita por multobligi la efikojn de la kreado.

"*Li rompis la panojn kaj donis ilin al la disĉiploj*", la samaj gestoj kiujn Jesuo plenumos en la lasta vespermanĝo kiam li prenas la panojn, dankas, rompas ilin, ilin donas al la disĉiploj, "*kaj la disĉiploj al la homamaso*". La disĉiploj ne estas proprietuloj de ĉi tiu pano, ne estas mastrumantoj, sed estas servistoj. Ilia tasko estas preni ĉi tiun panon, kiu reprezentas la eŭkaristion, kaj ĝin disdoni al la homamaso, sen meti kondiĉojn kaj sen meti limojn.

Precipe elstaras la foresto de iu ordono de Jesuo. Kial Jesuo ne ordonas al la homoj ke ili purigu sin? Antaŭ ol manĝi estis iu rito bone konata, deviga, kiu ne estis simpla higiena rito, ne sufiĉis lavi al si la manojn; estis necese purigi al si la manojn laŭ difinitaj ritoj kaj difinitaj preĝoj. Nu Jesuo, ĉiufoje kiam li troviĝas ĉe tagmanĝo kaj vespermanĝo – kaj tagmanĝo kaj vespermanĝo en la evangelioj ĉiam anticipas eŭkaristion – neniam petas aŭ trudas lavadon de la manoj.

Kia estas la signifo? Ne estas vere, ke la homoj devas purigi sin por partopreni la festmanĝon de la Sinjoro, sed kontraŭe estas la partopreno en la festmanĝo tio kio ilin purigas. Ĉi tiu estas la granda novaĵo alportita de Jesuo. La homo ne devas esti inda por partopreni en la festmanĝo, sed estas

la partopreno en la festmanĝo tio kio igas lin mastro. Pro tio Jesuo fariĝas pano kaj petas al la disĉiploj, ke li estu donacata, disdonata al la homamaso sen meto de kondiĉoj.

Ili manĝas ĝissate, kaj superfluas dek du korboj. La nombro dek du estas la nombro de la triboj de Izraelo, kaj la evangeliisto montras ke, pere de la kundivido – kaj ne pere de la amasigo – oni solvas la malsaton por la tuta popolo. Kaj jen fine altvalora detalo. "*Tiuj, kiuj manĝis, estis ĉirkaŭ kvin mil viroj*". La evangeliisto registras ĉi tie la saman nombron da homoj kiel la membroj, laŭ la Agoj de la Apostoloj, ĉapitro 4, versiklo 4, de la primitiva kristana komunumo.

Sed kial ĝuste kvin mil? La multobloj de kvindek en la Biblio montras la agadon de la Spirito. La profetoj, gvidate de la Spirito, iradis po kvindek. *Pentekosto* signifas nenion alian ol kvindeka, la kvindeka tago post la Pasko, kiu estas la tago en kiu en la kristana komunumo malsupreniras la Spirito. Ne plu iu eterna leĝo observenda, sed la Spirito, iu interna forto akceptenda. Tial la multobloj de kvindek montras la agado de la Spirito.

Do la evangeliisto, per ĉi tiu cifero, volas komprenigi ke, kune kun la pano, estis komunikita la spirito, kiu estis ĉe la bazo de la donaco. Kaj, fine, la detalo "*krom virinoj kaj infanoj*". Kial ĉi tiu detalo? Ĉar en la sinagoga kulto la celebrado povis komenciĝi nur kiam ĉeestis dek plenkreskaj viroj; la sinagogo povis esti plena je virinoj kaj infanoj, sed dum ne estis dek plenkreskaj viroj oni ne povis komenci la kulton.

Do, per ĉi tiu indiko "*krom virinoj kaj infanoj*", kiu estas maniero de kalkulado de la partoprenantoj en la sinagogo, la evangeliisto volas komprenigi, ke per Jesuo, en ĉi tiu epizodo de la kundivido de la panoj, naskiĝis la nova kulto. La nova kulto ne plu estas praktikata en iu sinagogo, sed ĉie kie ekzistas la praktikado de la beatproklamoj, la malavara kundivido. La nova kulto ne plu ekiras de la homoj al Dio, sed ĝi ekiras de Dio al la homoj, ĉar Jesuo de Mateo estas la Dio kun ni, kiu petas esti akceptata por ke kun li kaj kiel li la homaro fariĝu nutraĵo de vivo, de forto, direkte al ĉiu bezonanta homo.